# Esperanto - La Bitbulteno 96

esperanto.es


## ABIERTA LA MATRÍCULA PARA LOS NUEVOS CURSOS DE ESPERANTO EN LA UNED

Se ha abierto ya el plazo de matrícula para apuntarse a los cursos de esperanto impartidos por la Universidad Nacional de Educación a Distancia (UNED) a través de su Centro de Idiomas . Recordamos que en este curso 2024-2025 se impartirán de nuevo los niveles A2 (que en el caso del esperanto supone el nivel básico e incluye el A1) y B1. La matrícula finaliza el 22 de octubre.

Los miembros de la Federación gozan de un importante descuento en el importe de la matrícula. Basta indicarlo en el proceso de matrícula. La rebaja es lo suficientemente atractiva para que merezca la pena afiliarse a la Federación si no lo has hecho todavía.

También es posible apuntarse desde fuera de España, ya que la UNED dispone de centros asociados en numerosos países, sobre todo de Iberoamérica y Europa. Ni siquiera es necesario saber español, ya que el nivel B1 se cursa en esperanto.






## YA TE PUEDES APUNTAR AL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO DEL 2025

Cuando todavía estamos recordando el 82º Congreso Español de Esperanto, que tuvo lugar en septiembre en Cheste (Valencia), ya se han publicado las primeras informaciones sobre el Congreso del año 2025, que se celebrará en la bella e histórica ciudad de Soria, entre los días 1 y 4 de mayo.También puedes apuntarte ya en este formulario en línea.

Puedes también ver un pequeño vídeo, presentando el evento. En próximas semanas irán publicándose más informaciones, incluyendo detalles del programa. Estad atentos.




## CONCURSO DE IDEAS PARA LA DIFUSIÓN Y DESARROLLO DEL ESPERANTO

Uno de los momentos culminantes del Congreso de Esperanto en Cheste fue la recepción ofrecida por el Ayuntamiento, donde se

homenajeó a cinco veteranos esperantistas de la localidad.

Durante este acto se anunció también el lanzamiento de un Concurso de ideas para la difusión y desarrollo del esperanto, convocado por la Sociedad Cultural Ateneo "La Alianza" de Cheste, con la colaboración del Ayuntamiento de Cheste, la Fundación Cajacheste, el Grupo Esperantista "Lumradio" de Cheste y el Grupo Esperanto de Valencia.

Se repartirán 3 premios que van de los 400€ a los 1000€. La fecha límite es el 31 de diciembre de 2024. Las bases se encuentran en castellano en este enlace y en valenciano aquí.


Sociedad Cultural ATENEO LA ALIANZA — Ayuntamiento de Cheste CONCEJALÍA DE EDUCACIÓN — fundación cajacheste

## CHARLA SOBRE EL ESPERANTO EN HUESCA

El 24 de octubre se celebrará una charla sobre el esperanto en Huesca, en el Centro Cultural Manuel Benito Moliner, a las 19,30. Intervendrán Alberto Granados y Lorenzo Noguero, presidentes de los grupos de Teruel y Zaragoza. Os esperamos allí.

Alberto Granados fue entrevistado este pasado mes en la emisora de Onda Cero de Teruel. Puedes escuchar el audio aquí.






## EXPOSICIONES Y CURSOS EN CASTILLA Y LEÓN

Este año puede ser el del esperanto en Castilla y León. Además del congreso en Soria, podemos mencionar dos atractivas novedades que han comenzado en octubre.

En La Granja de San Ildefonso (Segovia) puede visitarse una exposición sobre el esperanto en la Casa de Cultura, que se ha ampliado hasta el 18 de octubre. A la vez ha comenzado este mes un curso de esperanto, impartido por David Trigo, que se desarrollará hasta el mes de diciembre. Son las primeras actividades de la Asociación Segoviana de Esperanto, recién constituida.

En León, la Universidad de León ha convocado un curso de extensión universitaria, de iniciación al idioma internacional, que se desarrolla durante todo el mes de octubre. El curso está siendo impartido por Francisco Balibrea, esperantista y profesor de la Universidad de León, con la colaboración de Francisco Javier Grande, profesor del departamento de Filología Hispánica y Clásica.



## AYUDAS DE LA FUNDACIÓN ESPERANTO

Hasta el 30 de noviembre se pueden enviar peticiones a la Fundación Esperanto, para solicitar subvenciones relacionadas con la lengua internacional. Habitualmente se ayuda con prioridad a grupos esperantistas, por actividades realizadas durante este año, pero este año se dispone de más posibilidades, gracias a la donación de un generoso *samideano*, y al crecimiento de ingresos.

Las prioridades son las actividades de difusión y enseñanza del esperanto, la edición de libros en o sobre el esperanto, la organización de eventos, pero también es posible presentar otras propuestas o sugerencias. Las peticiones deben llegar antes de 30 de noviembre del 2024, a la dirección

fundacion (ĉe) esperanto.es
.

## RENOVACIÓN DE LA DIRECTIVA DE LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Como anunciamos en nuestro previo Bitbulteno, durante el Congreso de Cheste tuvo lugar la asamblea general ordinaria de la Federación Española de Esperanto, en la que se renovó la directiva de la asociación.

No ha habido grandes cambios, con el mantenimiento del presidente, Ángel Arquillos, vicepresidente Alberto Granados, secretario Manuel Parra, tesorero Jesús M. García Iturrioz y vocal Vicente Manzano. Se han incorporado Elsa Martínez, Mila Mezo y Pako Balibrea. ¡Gracias a todos ellos y a los anteriores miembros!

## MALFERMIĜIS LA ALIĜO AL LA NOVAJ KURSOJ DE ESPERANTO EN UNIVERSITATO UNED

Jam estas malfermita la periodo de enskribiĝo al la kursoj de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado de Hispanio (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), instruitaj en ties Centro pri Lingvoj, denove en du niveloj A2 (baza, en la kazo de Esperanto entanenta la nivelon A1) kaj B1. La enskribiĝo finiĝas la 22an de oktobro (kvankam en aliaj jaroj oni ofte plilongigis ĝin en la lasta momento)

La anoj de la Federacio ĝuas tre altiran rabaton en la kosto de la enskribiĝo. Sufiĉas tion sciigi en la procezo de enskribiĝo. La rabato estas tioma, ke oni ŝparas monon se oni fariĝas nova ano de HEF.

Ankaŭ eblas aliĝi el aliaj landoj ekster Hispanio, ĉar la UNED havas sidejojn ("asociitajn centrojn") en pluraj landoj ĉefe en Iberameriko kaj Eŭropo. Eĉ ne necesas scipovi la hispanan por aliĝi al la kurso B1, kiu estas instruata nur en Esperanto. En tiu ĉi jaro HEF lanĉas specialan alvokon al la disvastigo de tiu ĉi ebleco en aliaj landoj, ĉar tio helpos en la plidaŭrigo de tiu ĉi kurso, kiu estas unika en la nuntempa stato de la agnosko de kursoj de Esperanto en Universitatoj. Se vi havas

malfacilaĵojn por la proceduro de enskribiĝo aŭ pri ajna teknika afero, nepre kontaktu kun HEF por ke ni povu helpi vin.




## JAM EBLAS ALIĜI AL LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO DE 2025

Kiam ni ankoraŭ konservas la memoron de la 82a Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en la valencia urbeto Cheste (vi povas legi raporton pri ĝi en La Ondo de Esperanto), komenciĝis la laborado super la 83a.

Vi jam povas legi la Unuan Anoncon pri tiu evento, kiu okazos inter la 1a kaj 4a de majo en la bela historia  malnovkastilia urbo Sorio (Soria). Vi jam povas aliĝi al ĝi, plenigante tiun ĉi retan formularon.

La sidejo estos la kultura centro Espacio Santa Clara, malnova monaĥejo, tute restaŭrita en la pasinta jaro, kiu disponas je ĉiuj necesaj eroj por la okazigo de la kongreso: salonoj, kunvenĉambroj, ripozejoj.

Vi povas spekti mallongan videon, prezentantan la okazaĵon. En venontaj semajnoj oni publikigos pliajn informojn, inklude de detaloj de la programo. Estu atentaj!



## KONKURSO PRI IDEOJ POR DISVASTIGO KAJ DISVOLVIĜO DE ESPERANTO

Pinta programero dum la Hispana Kongreso de Esperanto en Cheste estis la formala akceptado de esperantistoj en la Urbodomo, kie oni omaĝis kvin veteranajn esperantistojn de la urbo. Vi povas legi raporton (en la hispana) kun abundaj fotoj en la retejo de la urbestraro.

Dum tiu evento oni ankaŭ anoncis la starigon de konkurso pri ideoj por disvastigo kaj disvolviĝo de Esperanto, je la nomo “Francisco Máñez” (pioniro de la lingvo en la urbo). Ĝi estis lanĉita de la Kultura Societo Ateneo La Alianco el Cheste, kun la kunlaboro de la urbestraro de Cheste, la Fondaĵo Cajacheste, la Esperantista Grupo Lumradio de Cheste kaj la Grupo Esperanto de Valencio.


Oni disdonos tri premiojn, kun mona valoro de 1000, 600 kaj 400 eŭroj. La limdato estas la 31a de decembro kaj vi povas legi la regulojn tie ĉi.


**PRELEGO PRI ESPERANTO EN HUESCA**

La 24an de oktobro okazos prelego pri Esperanto en la urbo Huesca (Osko), ĉefurbo de la norda provinco de Aragono. La loko estos la kulturcentro Centro Cultural Manuel Benito Moliner, kaj la horo, la 19,30.

Parolos Alberto Granados kaj Lorenzo Noguero, prezidantoj respektive de la grupoj de Terŭelo kaj Zaragozo. Venu kaj disvastigu!

Krome, antaŭ kelkaj tagoj Alberto Granados estis intervjuita en la radiostacio Onda Cero de Teruel. Vi povas aŭskulti la programon en tiu ĉi ligilo.






## EKSPOZICIOJ KAJ KURSOJ EN KASTILIO KAJ LEONO

Tiu ĉi jaro povas esti la okazo por Esperanto en la regiono Kastilio kaj Leono. Krom la kongreson en Sorio, ni povas mencii du altirajn novaĵojn kiuj komenciĝis en oktobro.

En la historia urbo La Granja de San Ildefonso (provinco Segovio) eblas viziti ekspozicion pri Esperanto en la municipa Kulturdomo, kiu ĵus estis plilongigita ĝis la 18a de oktobro. Samtempe komenciĝis kurso de Esperanto, instruata de nia samideano David Trigo, kiu disvolviĝos ĝis la monato decembro. Ili estas la unuaj aktivaĵoj de la ĵus fondita Segovia Asocio de Esperanto.

En Leono, ties Universitato kunvokis kurson de Esperanto, kiu daŭros la tutan monaton oktobron. Ĝin instruas la esperantisto kaj profesoro de la Universitato Francisco Balibrea, kun la kunlaboro de la profesoro pri filologio Francisco Javier Grande.



## HELPOJ DE FONDAĴO ESPERANTO

Ĝis la 30a de novembro eblas sendi petojn al Fondaĵo Esperanto, por subvencioj pri aktivado rilate al la internacia lingvo. Kutime, oni helpas prefere al E-grupoj kaj pro aktivaĵoj jam faritaj, sed ĉijare oni disponas je pli da mono ol estis antaŭvidite, danke al oferemo de bonfarulo kaj al kresko de enspezoj.

Do oni prioritatigas helpojn por instruado kaj disvastigado de Esperanto, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj, sed eblas prezenti aliajn sugestojn aŭ proponojn. La petoj devos esti ricevataj antaŭ la 30a de novembro de 2024. Skribu al

fundacion (ĉe) esperanto.es

**RENOVIGO DE LA ESTRARO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

Kiel ni anoncis en la antaŭa Bitbulteno, dum la pasinta Hispana Kongreso en Cheste okazis Ordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio, dum kiu oni laŭstatute renovigis la estraron de la asocio.

Ne okazis grandaj ŝanĝoj, kaj plu restas en la estraro la prezidanto, Ángel Arquillos, vicprezidanto Alberto Granados, sekretario Manuel Parra, kasisto Jesús M. García Iturrioz kaj voĉdonanto Vicente Manzano. Al ili aldoniĝis Elsa Martínez, Mila Mezo kaj Pako Balibrea.

Dankon al ili kaj al la antaŭaj estraranoj!